


Fresko de la pentekosta kolombo (representante la Sanktan Spiriton) de la Karlskirche en Vieno.

La pentekosta himno “Veni creator spiritus” [eo: “Venu, Kreanto, Di-Spirito”] estas latina poeziaĵo, per kiu la kristanoj petas helpon kaj subtenon de la Sankta Spirito. La teksto devenas el la 9-a jarcento kaj oni laŭtradicie atribuas ĝin al Hrabano Maŭro. La origina gregori-ĥorala muzikigo okazis proksimume la jaron 1000. (Vidu Adoru 346)


HYMNUS DE SPIRITU SANCTO

VIII

V



E-ni, cre- á-tor Spí-ri-tus, mentes tu- ó-rum ví-si-ta,



imple su-pérna grá-ti-a quæ tu cre- ásti, péc-to-ra.

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.

Prezidanto: Philippe Cousson

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;

IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_boarad@yahoo.se

Kontrollegis: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady,
Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

Enhavo

Dek helpoj — pri la Dekalogo, 2a	51
Saluton ho oldaj Dioj ...	57
La morto de Peregrino	58
La tezoj de Pomeyrol	62
Financaj raportoj	64
Tagordo de la jarkunveno	68
Tial demokratio	68
Hugenota kruco	70
Informetoj – korespondpeto	71
Kanto: Venu, Spirito, venu al ni	72

Redaktoraj vortoj

Kara leganto, jam daŭris la milito en Ukrainio dum pli ol tri monatoj. Ne eblas eviti tiun okazaĵon. La popolo spertis terurajn kondiĉojn. Same soldatoj ambaŭflanke. Multaj virinoj kaj infanoj devis enlande aŭ eksterlanden fuĝi.

Kiel eblas ke ŝtat-gvidantoj povas fari tiajn terurajn decidojn kontraŭ najbaraj landoj?

Vidante la detruitajn urbojn, domojn pontojn k.t.p. levigās la demando — kiu povas poste rekonstrui kaj pagi por tiu rekonstruo? Grandega laboro atendas. Jam nun plendas homoj en Svedio, ke kreskis diversaj prezoj pro la milito kaj ni ankoraŭ ne vidas la finon. Samtempe la ukrainoj daŭre bezonas nian helpon divesmanieran. Ni ne laciĝu! Ni daŭre helpu laŭ niaj eblecoj!

Ĉi-jare ni havos fizikan kongreson en suda Hungario. Vi trovos financajn raportojn ĉi-gazete. Ni esperas je kutime bonetosa kongreso kun gajaj renkontiĝoj kun gefratoj. Raporton vi legos sekvont-numere.

Mi deziras al vi agrablan someron.

Dek helpoj — pri la Dekalogo

Dua ordono — Ne faru al vi skulptitan bildon!

József Farkas, hungara reformita pastoro

Serio de pritraktoj en Legnica de Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Ja tiom amis Dio la mondon, ke sian unikan filon Li donis, tiel ke ĉiu kiu fidis je li, ne pereu sed havu eternan vivon. Ĉar Dio ne sendis sian filon en la mondon por juĝi la mondon, sed por ke saviĝu la mondo dank' al li. Kiu fidis je li, ne estas juĝata; kiu ne fidis, jam estas juĝita, ĉar li ne fidis je la nomo de la unika filo de Dio. En tio konsistas la juĝo: La lumo venis en ĉi mondon, sed la homoj preferis la obskuron pli ol la lumon, ĉar iliaj agos estis malbonaj. Ĉar kiu faras malbonon, malamas la lumon; li ne venas al la lumo, ĉar alie liaj agoj fariĝos manifestaj. Sed kiu faras la veron, tiu venas al la lumo, por ke montriĝu pri liaj agoj, ke ili estas faritaj en Dio.

Johano 3, 16-22

Ne faru al vi idolon, nek bildon de io, kio estas en la ĉielo supre aŭ sur la tero malsupre aŭ en la akvo sub la tero; ne kliniĝu antaŭ ili kaj ne servu ilin; ĉar Mi, la Eternulo, via Dio, estas Dio severa, kiu la malbonagon de la patroj punas sur la idoj en la tria kaj kvara generacioj ĉe Miaj malamantoj, kaj kiu faras favorkoraĵon por miloj al Miaj amantoj kaj al la plenumantoj de Miaj ordonoj.

Eliro, 2a libro de Moseo, 20, 4-6

En Jerusalemo ĝis hodiaŭ turistoj vane provas fari fotojn pri ortodokaj judoj. Estas multaj interesaj fotoj en tiuj malgrandaj stratetoj: kiel interparolas, diskutas unu kun la aliaj judaj viroj kun longaj barboj, sed kiam ili rimarkas, ke iu volas foti ilin, ili tuj kovras sian vizaĝon. Tiel serioze ili tenas tiun ĉi regulon: ne faru bildon, ne nur pri Dio, sed ankaŭ ne pri homo. Dum jarmiloj restis tiu tradicio, kutimo. Ĉu ili troigas? Ĉu ili miskomprenas la leĝon? Mi proponas, ke ni ne rapidu juĝi pri tiu ĉi afero. Tiuj

strangaj homoj dum jarmiloj savis penson, kiun ili ankaŭ hodiaŭ akcentas kaj faras. Unue ni klopodu bone esplori tiun ĉi penson, kaj nur poste ni povas elformi opinion, ke tiun penson – kiu sendube estas dia eldiro – ankaŭ hodiaŭ ni tiel devas kompreni?

Tiun strangan demandon mi ĵetas: kial?

Kial Dio ne permesas, ke ni faru bildon pri Li? Kial doloras al Dio, se ni faras bildon pri Li? Ĉar certe doloras al Li, se iu faras bildon pri Li. Unue tiun

doloron ni devos travivi, kaj tiam ni ekkomprenos, kial Dio donas tiun ĉi malpermeson.

Tiun kuraĝan tezon mi diras, ke eblas kompreni la doloron de Dio. Se ni en nia malgranda viv-rondo ĉirkaŭvidas, ni povas senti la doloron de Dio kaj ni povas ekkompreni la esencon de tiu ĉi dia leĝo.

Antaŭ nelonge mi estis en societo, amika rondo, kie ankaŭ estis homoj, kiujn mi antaŭe ne konis. La homoj interparolis, diskutis, kaj iel la temo iris pri Dio. Iu turnis al mi, demandante, kio estas mia opinio, kaj iu alia diris: Oh, vi estas pastoro, vi diras vian opinion pro via profesio.

Kion signifas tio?

Tion tio signifas, ke tiu dua viro faris bildon, faris idolon pri „pastoro” – ne el ligno, ne el ŝtono – sed el ideoj, el pensoj. Tiu faris skatolon, tirkeston kaj metis min en ĉi tiun skatolon, sur kiu estas skribita „pastoro”. Antaŭ ol mi eĉ unu vorton estus povinta diri, mi jam estis en tiu ĉi

skatolo. En mi estas multaj pensoj kaj demandoj kaj protestoj. Jes, mi laŭ mia profesio, mia vivdestino estas pastoro, sed mi tamen rajtas havi propran opinion! Mi sentis tion terure maljusta, ke tiu viro ne pensis pri mi, kiel memstara, pensanta homo, kiu povas havi propran opinion, li vidis nur ion antaŭe faritan, pretan bildon „pastoro” kaj tute ne vidis min – nur tiun ĉi bildon. Kaj en tiu agado vere estis io doloriga, kio estas iomete ankaŭ la doloro de Dio, kiam oni volas fiksi Lin en skulptaĵon.

Do tiel eblas trasenti la doloron de Dio, kiam oni volas fiksi, rigidigi Lin en bildon. Pri tio Dio ne ĝojas, tio doloras al Dio, tion Dio malpermesas.

Ankaŭ ni ne ĝojas aŭdi: Ho, jes, vi estas virino! Ho, kompreneble, vi estas judo! Oni antaŭe faris bildon pri la kutima agado de virinoj aŭ judoj, kaj metis ĝin en skatolon. Homoj laboras per tirkesto, faras bildojn, skulptaĵojn. Kaj ni tuj sentas, ke tio estas maljusta! La



Bildo el *Hortus deliciarum* [La ĝardeno de ĝuoj] de Herrad von Landsberg. 12a jc.

homo ne estas tio, pri kio alia homo imagas lin.

Estas natura kaj komprenebla la agado de homoj. Estas malfacile al ni, ke pri ĉiuj homoj ni pensu kiel diversaj personecoj. Ni ĉiuj havas emon fari redukton, ni volas simpligi la mondon. Anstataŭ pensadi pri ĉiuj aĵoj aparte, ni faras kategoriojn: ekzemple „la virinoj”, kaj ĉiujn kazojn ni metas en ĝin. Aŭ ni faras skatolon: la ateistoj, kaj ni sentas, ke ni sukcesis regi la realecon, kiu havas milionojn da variaĵoj. Kaj kiam ni faras tiujn kategoriojn, tiujn bildojn – tiam ni povas regi la mondon.

Vi ne volu tiel malmultekoste solvi la aferon, ke vi faras kelkajn ŝablonojn, kliŝojn, kaj vi metas en ilin la homojn, kaj tiel vi regas la tutan mondon. Pri ĉiuj vi havas bildon, kaj tiel la mondo estas travidebla, simpla, kaj vi povas regi ĝin. En tiu ĉi agado, ke homo faras bildon – antaŭlonge oni faris primitive per lignaĵo kaj per ŝtono, nuntempe oni faras pli malsimple, per filozofiaj pensoj – estas tiu deziro, ke homo sukcesu venki kaj regi super ĉiuj aferoj.

La historio de religio bone esploris tion: pro tio homoj faris bildon, skulptaĵon pri dioj, ĉar tiel la homoj volis regi super dioj. Jes, kompreneble ili amis sian Dion, oferis al Li. Eĉ vestis kaj simbole nutris la „diojn”, faris antaŭ la skulptaĵo ceremoniojn. Sed la esenco estis, ke tiel ili regu Dion.

Dio, mi nutras vin, mi vestas vin, mi oferdonas al vi, sed kiel repago vi faru, kion mi volas.

Tion ne permesas Dio!

Ne permesas en tiu primitiva formo, kiel la paganoj faris, kaj ankaŭ tiel ne permesas, kiel kristanoj agas: mi havas bildon pri Dio, kaj pro tio, ke mi konas Dion, mi volas devigi Lin servi miajn celojn. La radikon de tiu ĉi pensmaniero, de tiu ĉi agado, volas fortondi Dio, kiam Li diras: Ne faru bildon!

Estas en la malnova testamento historio: dum la tempo de la ĉefpastoro Levi, kiam judoj militis kontraŭ filiŝtoj. La unuan batalon la judoj perdis, la popolo senesperigis. Kion oni devus fari? Tiam venis la ideo, ke ili kunportu la keston de la interligo en la tendaron. Interesa estas la tendenco. Ili ne rajtis fari bildon, sed estas tie la kesto de la interligo, kiu tamen reprezentis Dion, estis simbolo de Dio. Ili malgajnis, do la solvo estas kunporti la keston tien. Tiel Dio estos tie kaj ili gajnos la sekvantan batalon. Kaj ili perdis ankaŭ la sekvontan batalon! Dio ne permesas tian solvon.

Dio havis iun proceson kun sia popolo, kaj ne permesis tiel simple solvi la aferon, ke la plendon, kiun Dio havas kontraŭ sia popolo, ni solvu per iu mirakla agado. Eĉ Dio permesis, ke la filisteoj for-rabu la keston kaj la filiŝtoj metu ĝin apud la skulptaĵon de sia dio. Dio permesis, ĉar volis instrui al sia popolo: ne eblas manipuli Lin, precipe ne tiel mirakle, ke estas bildo aŭ skulptaĵo de sanktulo, mi bruligas kandelon kaj tiel ĉio estos en ordo, mi movigas ĉielajn fortojn.

Estas la ĉiama batalo en religia historio: ĉu Dio movigas min, ke mi akceptu Lian sanktan volon, aŭ mi sukcesas movigi Dion, ke Li realigu mian celon.

Ni devas bone kompreni, ke kristanismo estas tiu unika entrepreno en la granda familio de religioj, kie homoj radikale rezignas pri tio, ke Dio servu la volon de homoj. Kristanismo diras: Mi certas, ke la volo de Dio estas pli bona ol mia volo. Mi donas min mem al la volo de Dio, kaj mi akceptas, ke Li gvidu min tien, kien Li volas.

Tiu ĉi rezigno estas en la dua ordono: ne vi volu movigi Min, sed kontraŭe, Mi, via Dio kunportos, gvidos vin, homojn.

***Jesuo ĉiam alimaniere
agis en diversaj situacioj,
lia agado estis
ne antaŭkalkulebla,
ne eblis posedi lin,
nur omaĝi lin***

Ni havas nur unu nuran aŭtentikan Dibildon: estas Jesuo Kristo.

En Jesuo Kristo montris sin Dio, sed la esenco de tiu ĉi montrado estas la movo, kiel Jesuo ĉiam alimaniere agis en la diversaj situacioj, ke lia agado estis ne antaŭkalkulebla, ne eblis posedi lin, nur omaĝi lin. En Jesuo Kristo Dio montris Sin, kiel senfina mizerikordo, montris Sin kiel amiko de kulpantoj, kiel Bonan Ŝafiston, kiu iras post la centa, perdita ŝafo. Dio estas tia. Sed ne eblas misuzi tion tiel, ke mi estos la centa ŝafo kaj Li devos veni post mi. Ne eblas tiel misuzi, ĉar ankaŭ Jesuo Kristo estis, kiu per vipo iris kontraŭ la komercistoj, kiuj volis alproprigi Dion.

Se ni volas renkontiĝi kun Dio, ni povas renkontiĝi kun Li en Jesuo Kristo. Kaj nur tiel ni povas renkontiĝi, se ni genuas kaj transdonas nin mem, ni rezignas – ne tiel, ke pro Jesuo Kristo Dio faru, kion mi volas.

La alia afero, kiu ankaŭ estas en tiu ĉi ordono, estas la homo. Laŭ mia kredo la jerusalemaj judoj pravas, kiam ili ne permesas fari foton pri ili. Sed kompreneble ne en tiu primitiva senco, ke oni ne faru foton, sed en spirita senco: tiel ni ne faru „bildon” pri la alia homo, ke ni nenium metu en skatolon. Tiu estas nia ĉiama labormetodo. Ni havas fiksan bildon pri niaj infanoj, pri nia edzo, edzino, pastoro, kontraŭlo. Laŭ mia kredo ni tion ne rajtas fari. En la dua ordono troviĝas ankaŭ tiu malpermeso: ne faru bildon pri la homo, ĉar la homo estas pli multe, ol kion la foto fiksas, kiel ajn punkta estas tiu bildo. Kompreneble la patro, patrino konas sian infanon, sed mi certas, ke la infano jam estas alia, ol la gepatroj imagas lin aŭ ŝin. La bildo ne povas tiel rapide ŝanĝiĝi, kiel rapide la homoj ŝanĝiĝas. Kaj tiel estas ankaŭ pri la edzo, edzino. Ni ĉiuj ĉiam ŝanĝiĝas. Ne simpligu viajn pensojn, ĉar la tempo pasis, kaj la homo ŝanĝiĝis.

Ni devas iri eĉ pli profunden. Ne simple okazas, ke mi eraras, ĉar la realeco ŝanĝiĝis, kaj mi havas rigidan, fiksitajn bildon pri Dio, pri homo. La moderna psikologio montras ankaŭ tion, ke tiuj bildoj estas malutilaj. Estas malutilaj ne nur al mi mem, sed ankaŭ pri la alia homo.

Max Frisch havas mallongan romanon per la titolo *Andorra*, kies ĉefrolisto estas

junulo, pri kiu iel estiĝas klaĉo, laŭ kiu li estas juda. Kaj tion bildon oni komencas projekcii al la junulo: jen, li ĉion faras por mono. Ili komencas akuzi lin, kaj paŝoj post paŝoj, je la fino jam ankaŭ li mem kredas la malbonaĵojn, tiel forte oni projekcias la antaŭfaritan bildon pri li. Li ne povas defendi sin mem, la malamo kreskas kaj kreskas kaj fine oni atakas kaj mortigas lin. Tiam malkovriĝas, ke li ne estis juda, li estas tute same andora viro, kiel la aliaj, eĉ unu vorto de la klaĉo ne estis vera. Oni projekciis tiun bildon al li, kaj fariĝis situacio, en kiu li ne povis esti, kiu li vere estis, ne povis eliri. Ŝokita! Ne teologo, sed romanverkisto klarigas al ni tiun ĉi ordonon: ne faru bildon! Ne utilas al vi, kaj malutilas al la alia homo.

Mi rememoras pri diraĵo de Jean Paul Sartre. Oni demandis lin iam, kion signifas „mi”? Kaj li tion mallongan, sed tre interesan respondon donis: mi estas mia libereco! Mi heredis mian korpon, mian karakteron, mi havas multajn heredaĵojn de miaj antaŭuloj, sed tio ne estas mi. La koloron de mia okulo kaj hararo determinas la koloro de miaj gepatroj, geavoj, sed tio ne estas mi. Mi estas mia libereco. Mi estas tiu, kiu faras ion per tiu ĉi heredaĵo.

Kaj tie ĉi ni komprenas la pravon de tiu ĉi ordono: kiu faras bildon pri la alia homo, forrabas de tiu alia homo la eblecon, la liberecon kaj fiksas, rigidigas lin en bildon: tia vi estas! Mi konas vian patron, patrinon, mi scias, kiel vi agas. Fari bildon signifas, ke mi fiksas la hieraŭan vi, aŭ eĉ la hodiaŭan vi, kaj tiel mi malebligas la liberan burĝonadon de la morĝaŭa vi. Tio validas pri la rilato de

edzo-edzino, lernanto-instruisto: mi konas vian patron, li estas fiulo, do ankaŭ vi estos fiulo! – diras la instruisto kaj devigas la infanon fariĝi fiulo. Timige konkreta estas tiu ĉi problemo.

Ne volu ŝnurigi Min per via hieraŭa Di-kono, Di-scio! Tio ne temas nur pri vortoj, sed temas pri dogmatikaj sistemoj. Pro tio, ĉar vi hieraŭ, antaŭhieraŭ ekkonis Min iel, ne fiksi Min tiel, ne volu ŝnurigi Min, ne volu kalkuli, kiel Mi agos. Homo, Mi ne donas al vi Mian liberecon.

Dio diras tion: ne faru al vi mem fiksitan, ŝnuritan bildon pri alia homo, ĉar per tio vi forrabas la liberecon de la alia homo.

Sed ankaŭ en la intereso de la homo Dio diras tion: ne faru al vi mem fiksitan, ŝnuritan bildon pri la alia homo, ĉar per tio vi forrabas la liberecon de la alia homo. Ne faru bildon, sed elektu la pli malfacilan vojon: mi ne scias, kiel li ŝanĝiĝas, mi atentis kaj lasas, ke la alia homo montru, kia li aŭ ŝi estos.

La dua ordono estas la leĝo de la libereco. Kiel ankaŭ la aliaj ordonoj temas pri la libereco. Dio pretendas al Si mem la agad-liberecon, pro tio Li ne permesas, ke homo faru skulptaĵon pri Li. Sed samtempe Dio pretendas la liberecon ankaŭ al la homoj.

Mi iras eĉ pli profunden. Mi ekkomprenis, ke tiu, kiu faras skulptaĵon, je la fino mem fariĝas skulptaĵo. Tiu

versiklo memorigas min pri tio, kiam Dio helpis al Lot kaj al lia familio forlasi Sodomon, sed la edzino de Lot ne povis disiĝi de sia ŝatata urbo. Kvankam Dio malpermesis, la edzino de Lot ne povis ne rigardi reen, ne fari lastan bildon pri Sodomo, ke ŝi ne kunportu en sia koro bildon pri la belega urbo, kaj ŝi fariĝis „skulptaĵo”. La mitaj elementoj ne estas gravaj, grava estas la belege profunda mesaĝo, kiu estas en ili. Kiu nepre volas fari bildon, kaj ne volas lasi la realon esti libera, tiu mem fariĝas bildo. Tiel konkreta estas la dua ordono.

Se vi amas Dion, vi donas al Li liberajn manojn. Tiu amas Dion, kiu diras: eĉ se Vi punas min, Vi pravas, kaj se Vi savas min, mi adoras Vin.

Mi scias, ke Vi estas Dio, Vi estas la patro de Jesuo Kristo, kaj ankaŭ morgaŭ vi donos grandiozan signon de via pacienco kaj amo. Mi jam atendas la

morgaŭan tagon: kion ĝi kunportas? Kiu donas liberecon al Dio, tiu amas vere Dion. Kiu donas liberecon ankaŭ al homo, tiu amas vere la alian homon. Jes, estas la vero, ke hieraŭ vi batis min kaj malbele agis kontraŭ mi, sed hodiaŭ vi certe agos alimaniere. Mi ne permesas, ke via hieraŭa fiagado ŝnuru min. Mi atendas, kiu vi estas hodiaŭ, kiel vi proksimiĝas al mi.

Kara mia ĉiela Patro, mi ne scias, kion vi faros, sed mi fidas al Vi, ĉar en Jesuo Kristo mi komencis ekkoni Vin. Ni donu tiun liberecon unu al la alia. Se ni havas malbonajn memorojn, ne gravas, ne validas. Vi estas homo, vi estas libera, kaj hodiaŭ mi neŭtrale kaj libere volas renkontiĝi kun vi.

Tiel valoras vivi.



Ho kara Sinjoro, montru al mi miajn kaŝitajn mankojn. Liberigu min de miaj malbonaj pensoj, sopiroj kaj agoj. Mi estu sincera je mi mem, je Vi kaj je miaj geamikoj.

17. junio

El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso en la kolofono). Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.



Saluton ho oldaj Dioj...

Ho kie vi estas? Izisa, Anat kaj Dagon',
ho Oziriso, Moloĥ', vi Enurestu,
vi Amon-Râ kaj Baal, Saturno, Engurra,
U-dimmer-an-kia, ho moŝto Tammuz,
Odin kaj Hadad kaj ja ĉiuj ceteraj:
ja kie, ho kie vi estas, Dioj malnovaj?
Dum miloj kaj miloj da jaroj la homoj ŝvitadis,
baraktis, skulptis, adoris, homoj konstruis.
Ili vin amis – aŭ timis

 aŭ timis kaj amis samtempe
en strange komplika hom-paradokso.
Miloj da pastroj, eĥnuĥoj, birdrigardantoj,
miloj da ĉefepiskopoj, profetoj, sorĉistoj,
miloj da sanktuloj, piuloj, timemaj gejunuloj
oferis sian vivon unikan
esperis,
 ke pro ĉi ofero
 la ter' renaskiĝos
 revenos la sun' post eklipso
 denove inundos la grundon Nilo fertile
 la luno revenos
la tajdo refluos

Kie vi estas? Kie vi restis?
Kie do estas
 la tombejo de Dioj
 ne plu uzataj?

Gerrit Berveling

La morto de Peregrino

Lukiano al Kronio: bondezire!

Gerrit BERVELING, NL

La **Morto de Peregrino** estas satiro de la siria greka verkisto Lukiano en kiu la ĉeffiguro, la cinika filozofa Peregrinus Proteus, ekspluatas la malavarecon de kristanoj kaj vivas malsinceran vivon antaŭ ol li sin bruligas ĉe la Olimpikoj en 165 p.K.

La teksto estas historie signifa ĉar ĝi enhavas unu el la plej fruaj taksadoj de frua kristanismo de ne-kristana verkinto. /Vikipedio

1 La malfeliĉa Peregrino, aŭ kiel li prefere sin nomis, Proteo, faris ekzakte la samon, kion Proteo faris ĉe Homero¹. Ŝanĝiĝinte en ĉion ajn por liberiĝi, finfine li ŝanĝiĝis en fajron; tiel granda, ŝajne, estis lia obseda amo je famo. Kaj nun tiu genia amiko laŭ la maniero de Empedoklo karbonigis sin, krom ke ĉi lasta minimume klopodis eskapi observadon, ĵetante sin en la krateron, dum tiu ĉi atendis ĝis okazos unu el la grandaj grekaj festivaloj kiu ja altiras la plej grandajn homamasojn, tie konstruis egan brulŝtiparon kaj saltis en la flamojn antaŭ tiom da atestantoj; li eĉ jam kelkajn tagojn anticipe turnis sin al la grekoj por informi ilin pri la sama temo.

2 Multe mi ja vidas vin ridi pri la stulteco de la maljunulo – ja, mi eĉ aŭdas vin krei, kiel estas nature: “Ho, kia stultaĵo! Ho, la vana gloro! Ho –” kion ajn ni diri kutimas pri io simila. Nu, vi tion ja faras je distanco kaj kun multe pli granda sekureco, sed mi tion diris tuj rekte ĉe la fajro kaj pli frue eĉ en granda popolamaso da aŭskultantoj, kolerigante

eĉ kelkajn el ili – ĉar multaj admiris la frenezon de la maljunulo; sed same estis kelkaj krom mi, kiuj ridis pri li. Nu, mi apenaŭ eskapis, ke membro-post-membre mi estu disŝirita de la Cinikuloj, kiel Aktajono de la hundoj aŭ lia parenco Penteo de la Menadoj.

3 La tuta aranĝo de la afero estis jena: vi scias, kompreneble, kia estis la aŭtoro kaj kiel mirindan prezentadon dum sia tuta vivo li realigis, superante Sofoklon kaj Eŝilon. Koncerne mian rolon en ĝi, tuj kiam mi venis al Eliso, suprenirante al la gimnazio, mi subaŭskultis iun Cinikulon, kiu eldiris la kutimajn stratulajn alvokojn al la Virto per laŭta, kruda voĉo, sakrante kontraŭ ĉiu senescepte. Tiam lia oratorajo transiris al Proteo, kaj per mia tuta kapablo mi klopodos citi al vi la ekzaktajn vortojn, kiujn li uzis. La stilon vi trovos konata, ĉar ofte vi staris apude dum ili bruegis.

4 “Ĉu ja iu ajn”, li diris, “kuraĝus nomi Proteon vanta, ho Tero, ho Suno, ho Riveroj, ho Maro, ho Heraklo, Dio de niaj patroj! – Proteon, kiu estis

kaptita en Sirio, Proteon, kiu oferis kvin mil talantojn pro sia naskiĝa lando, kiu estis ekzilita el la urbo Romo, kiu pli brilas ol la Suno, kiu povas rivali je Olimpa Zeŭso mem? Ĉar li decidis forlasi la vivon per la fajro, ĉu estas homoj kiuj atribuas al li vanan gloramon? Kio! Ĉu ne Heraklo agis same? Ĉu ne Asklepio kaj Dionizo, pere de la fulmo? Ĉu ne Empedoklo mortis saltante en la krateron?”

5 Kiam tion diris Teageno – ĉar tiel nomiĝis la krianto –, mi demandis unu el la ĉeestantoj: “Kion signifas tiu diro pri fajro, kaj kiel rilatas Heraklo kaj Empedoklo al Proteo?” – “Baldaŭ”, li respondis, “Proteo dum la Olimpia Festivalo sin bruligos”. – “Kiel”, mi diris, “kaj kial?” Kaj tiam li komencis rakonti al mi, sed la Cinikulo tiom blekis, ke nenion alian mi povis percepti. Mi do aŭskultis, dum li priŝprucis nin per la resto de sia buŝakvo kaj ricevis amason da hiperboloj pri Proteo, ĉar, ne degnante kompari lin kun la viro de Sinopo², aŭ kun Antisteno, aŭ eĉ kun Sokrato mem, eĉ Zeŭson mem li provokis al sia listo. Tiam, tamen, li decidis juĝi ilin ambaŭ pli malpli egalaj, kaj jene li finis sian oratoraĵon: **6** “Tio estas la du plej noblaj majstraĵoj, kiujn iam ajn spektis la mondo – la Olimpa Zeŭso kaj Proteo; la unuan kreis la artisto Fidio, la alian la Naturo. Sed nun ĉi sankta bildo estas baldaŭ forironta de inter ni homoj al la Dioj, portata sur la fajro, postlasonte nin kvazaŭ orfojn”. Fininte tiun ĉi oratoraĵon kun multe da ŝprucado, larmojn li verŝis tre ridinde kaj disŝiris al si la harojn, tre atentante, ke li ne tiru tro forte; fine li estis

forkondukita, plorsingultanta dumirade, gvidata de unu el la Cinikuloj, kiu klopodis konsoli lin.

7 Post li tuj aperis alia viro³, ne permesante, ke la amaso disiĝu, sed li metis verŝoferon sur la antaŭaj oferoj, dum tiuj ankoraŭ flagris. Unue longtempe li ridis, kaj estas ja klare, ke tion elkore li faris. Tiam li komencis pli malpli jene: “Ĉar tiu damnita Teageno finis siajn venenajn dirojn per la larmoj de Heraklito, mi, male, ekos per la ridado de Demokrito.” Kaj longe li plu ridadis, tiel ke la plimulton de ni li kuntiris imiti lin. Tiam, ŝanĝante sian sintenon, li diris: **8** “Ho, viroj, kion alian ni faru, se ni aŭdas tiel ridindajn dirojn, kaj vidas oldulojn publike stari surkape por nur eta kaj senvalora atento? Por ke vi komprenu, kio estas tiu ‘sankta bildo’ kiu baldaŭ forbrulos, donu al mi viajn orelojn, ĉar mi observis lian karakteron kaj tenis miajn okulojn ĉe lia kariero ekde la komenco, kaj plurajn detalojn mi sendubigis ĉe liaj kun-civitanoj kaj homoj, kiuj neeviteble konas lin ĝisfunde.

9 “Tiu kreaĵo, majstraĵo de la naturo, tiu kanono de Poliklito⁴, tuj kiam li fariĝis adolta, en Armenio estis perfortita, kaj suferis fortan travipadon, sed fine saltis suben de la tegmento kaj eskapis, dum rafano fermis lian pugon. Poste ĉarman knabon li seksperfortis, kaj pagante al la gepatroj de la knabo, kiuj estis tre povraj, tri mil draĥmojn, li aĉetis sin libera de denuncado antaŭ la provincestro de Azio.

10 “Sed ĉion ĉi kaj similaĵojn mi proponas preterlasi; ĉar li estis nura senforma argilo, kaj nia ‘sankta bildo’

por ni ankoraŭ ne formiĝis. Kion al sia patro li faris, tamen, estas tre aŭskultinda; sed vi ĉiuj ĝin ja scias – vi aŭdis, kiel la maljunulon li strangolis, nekapabla lasi lin vivi post la sesdeka jaro. Tiam, kiam la afero diskoniĝis eksteren, li sin kondamnis al ekzilo kaj ĉirkaŭvadis, irante de lando al lando.

11 “Estis tiam, ke li ekkonis la mirindan instruon de la Kristanoj, asociiĝante kun iliaj pastroj kaj skribistoj en Palestino. Kaj – kiel alie povus esti? – en nur mallonge li igis ilin aspekti kiel infanoj; ĉar li estis profeto, grupestro, gvidanto de sinagogo, kaj ĉio tia, tute sola. Li interpretis kaj klarigis kelkajn el iliaj libroj kaj eĉ multajn verkis, kaj ili kultis lin kvazaŭ Dion, uzis lin kiel leĝdonanton, kaj starigis lin kiel protektanton, tuj post tiu alia, kiun ili ankoraŭ adoras, la viron kiu estis krucumita en Palestino, ĉar tiun novan kulton li enkondukis en la mondon.

12 “Tiam fine Proteo estis arestita enmetita en malliberejon, kio en si mem donis al li ne etan famon profite al lia posta kariero kaj la ĉarlatanaĵo kaj la fam-serĉado, pri kiu li plene enamiĝis. Nu, kiam li estis enkarcerigita, la Kristanoj, rigardante la okazaĵon kiel ion teruran, lasis nenion nefarita en sia klopodado savi lin. Kiam tio montriĝis neebla, ili montris al li ĉiun alian formon de atento, ne iel hazarde, sed tute sisteme; kaj de la pleja komenco de la tago apud la malliberejo oni povis vidi atendi aĝajn vidvinojn kaj orfajn infanojn, dum iliaj gravuloj eĉ dormis interne apud li, subaĉetinte la gardistojn. Tiam estis enportitaj ampleksaj manĝaĵoj, kaj

sanktaj libroj de ilia ĉirkaŭo estis voĉlegataj, kaj la mirinda Peregrino – ĉar tiel li ĉiam ankoraŭ estis nomata – estis titolita de ili ‘la nova Sokrato’.

13 “Eĉ venis homoj el la urboj de Azio, kiujn la Kristanoj sendis proprakoste, por helpi, defendi kaj kuraĝigi sian heroon. Ili montras nekred-eblan rapidon, kiam devas esti farita publika agado; ili disipas kelkmomente al ĉiuj. Same okazis tiam pri Peregrino; pro lia enkarceriĝo multe da mono venis al li, kaj li ne malmulte el tio enspezis. La povruloj konvinkis sin mem, unue kaj ĉefe, ke ili fariĝos senmortaj kaj vivos poreterne, sekve de kio la morton ili malŝatas kaj eĉ plejmulte libervole sin transdonas al kaptiteco. Krome ilia unua leĝdonanto persvadis ilin, ke ili ĉiuj estas fratoj unuj de la aliaj, tuj kiam la Grekajn Diojn ili malkonfesis kaj adoras tiun krucumitan sofistojn kaj vivas laŭ ties leĝoj. Tial ĉion ili disponas sendistinge kaj tion konsideras komuna propraĵo, akceptante tiajn doktrinojn tradicie sen ajna pruvo. Se do iu ĉarlatano aŭ trompisto, kapabla hazarde profiti, venas inter ili, rapide li akiras riĉon impresante tiajn simplulojn.

14 “Tamen, Peregrino estis liberigita de la tiama arĥonto de Sirio, viro kiu tre amis filozofion. En la certeco, ke volonte li mortos por postlasi famon pri tio, li liberigis lin, eĉ ne degnante lin inda je la kutima punado⁵. Revenante hejmen, li trovis ke la afero pri la murdo je lia patro ankoraŭ estas brulvarma, kaj ke estas multaj, kiuj insistas kulpigi lin je patromurdo. La plimulto de liaj posedaĵoj estis forportita

dum lia malĉeesto, kaj nur liaj bienoj restis, entute valorante ĝis ĉirkaŭ dek kvin talantoj; ĉar la tuto, kiun postlasis la maljunulo, valoris ĉirkaŭ tridek talantojn, ne kvin mil, kiel asertis la plej ridinda Teageno. Eĉ la kompleta urbo Pario⁶, kuntrenante kun si la kvin najbarajn urbetojn, ne tiom valorus, inkluzive homojn, kastelon, kaj la tutan ceteraĵon.

15 “Sed la akuzo kaj la plendo ankoraŭ flagris, kaj ankoraŭ estis eble, ke baldaŭ iu leviĝos kontraŭ li; antaŭ ĉio, la homoj mem estis koleraj, plorantaj pri bona maljunulo (kiel lin nomis tiuj, kiuj lin vidis) tiel malpie buĉita. Sed rigardu, kiel mirindan planon elpensis nia Proteo por respondi ĉi ĉion, kaj kiel la danĝeron li eskapis. Aperante antaŭ la konveno de la Parianoj – li nun portis sian hararon longa, vestite en malpura mantelo, kun monsako metita ĉe la flanko, kaj ĝenerale li aspektis tre teatraĵe – tiuaspekte aperante antaŭ ili, li diris, ke al la ŝtato li heredigas ĉiun havaĵon, kiun lia patro de benata memoro postlasis al li. Kiam la popolo, povruloj gapantaj pri disdonado, tion aŭdis, ili tuj levis siajn voĉojn: ‘Jen vera filozofo! Jen vera patrioto! La sola vera rivalo de Diogeno kaj Krateso!’ Liaj kontraŭuloj estis buŝumitaj, kaj ĉiu, kiu klopodis mencii la murdon, estis tuj superŝutita per ŝtonoj.

16 “Tiam duafoje la hejmon li forlasis, por ĉirkaŭvagi, kunportante sufiĉe da mono de la Kristanoj, dank’ al kies subteno li vivis en granda riĉo. Certan tempon li sufiĉe frandis; sed poste, ĉar eĉ kontraŭ ili li misfaris – oni vidis, mi supozas, ke li manĝas ion al ili

malpermesitan⁷ –; ili ne plu akceptis lin, kaj tiel, senespere li kredis, ke li devas retreti kaj li repetis de la urbo siajn posedaĵojn. Prezente peticion, li atendis ricevi tion laŭ ordono de la Imperiestro. Sed ĉar la urbo sendis reprezentantojn por kontraŭi la postulon, li atingis nenion, sed ricevis la ordonon kontenti pri kion nun li havas, ĉar ja sen ajna devido libervole li fordonis tion.

Daŭrigota

----- Piednotoj

1. Kiel la mara Dio ŝanĝiĝis dum sia provo eskapi Menelaon, kiu deziris konsulti lin, legeblas en Odiseado IV,454-459.
2. Diogeno.
3. Evidente la cinikulo parolis de iu alta loko, eble la Portiko de la Gimnazio; la nova parolanto prenas la parolon de tie. Tiu “alia persono” tre povas esti Lukiano mem.
4. La proporciojn de statuo de nuda junulo kun lanco (la Doryphoros), farita de Poliklito, la skulptisto analizis en libro nomata Kanono; oni vaste akceptis tion kiel kanonon por la nuda viro.
5. Skurĝado.
6. Ne tiel eta Greka urbo ĉe Helesponto, Romia kolonio ekde imperiestro Aŭgusto.
7. En Agoj 15:29 la apostoloj kaj la pliaĝaj fratoj preskribas deteni sin “de oferitaĵo al idoloj, de sango kaj de strangolitaĵo”. Eble Lukiano pensas pri paganaj viand-oferoj. Ankaŭ tre povas esti, ke temas pri la konata seninteresiĝo de la Cinikuloj pri kion manĝi. Eble Peregrino substrekis sian reiron al Cinikismo per partoprenado je iu stratangula “Manĝo de Hekata”.

(Red: ĉapitroj 6 kaj 8 intense estas aliaj, ĉar estas parto de la antaŭa frazo.)

☪

La tezoj de Pomeyrol

Tradukis Philippe COUSSON, FR

En 1941 en Pomeyrol, Suda Francio, post kiam la franca registaro kunlaboranta kun la germana okupacianto starigis leĝojn kontraŭ la Judoj, kelkaj reformitaj respondeculoj, pastoroj aŭ ne, kunvenis por iniciati reziston kaj proteston kontraŭ la leĝoj difinantaj la statuson de la Judoj. Tiuj tezoj havis efikon. La ekleziaj instancoj reagis kaj agis, videble protestis kaj kaŝe agis.

Kelkaj pastoroj kaj fideluloj, kunvenintaj la 16an kaj 17an de septembro por serĉi kune tion, kion la Eklezio devas diri al la mondo hodiaŭ, verkis la jenajn tezojn; ili submetas ilin al la Reformita Eklezio de Francio kaj proponas ĝian studon en pastoraj kunvenoj, presbiteraj konsilantaroj kaj sinodoj, petante Dion, ke li donu al ni la gracon konfesi nian kredon.

La rilato inter Eklezio kaj Ŝtato (tezoj 1 ĝis 4)

- I – Estas nur unu Sinjoro kaj de la Eklezio kaj de la mondo, Jesuo Kristo, Savanto kaj Reĝo. La Eklezio anoncas al ĉiuj homoj la reĝecon de ĉi tiu Savanto. Precipe ŝi instruas al la mondo la volon de Dio pri la ordo, kiu devas tie regi (Fil 2:9–11; Kol 1:15–19).
- II – Estas la tasko de la Eklezio, kiel komunumo, prijuĝi la konkretan situacion de la Ŝtato aŭ de la nacio, ĉiufoje kiam temas pri la ordonoj de Dio (kiuj estas la fundamento de ĉia vivo komuna). Tamen ŝi ankaŭ scias, ke Dio apartigas iujn virojn por memori la Eklezion pri ĉi tiu tasko, aŭ por plenumi ĝin anstataŭe. Eldirante ĉi tiujn juĝojn, la Eklezio ne forgesas, ke ŝi mem estas sub la juĝo de Dio. Ŝi pentas pri siaj perfidoj kaj silentoj (Jer 1:4–9; Jeh 3:17; Dan 9:4–19; Agoj 4:24–31; 1 Pet 4:17).
- III – Ĉi tiu servado de la Eklezio al la mondo normale esprimiĝas en la predikado de la Vorto de Dio; ĝi esprimiĝas ankaŭ per la rezolucioj kaj alpetoj de la Sinodoj kaj aliaj ekleziaj instancoj, kaj se necese, per iliaj intervenoj ĉe la aŭtoritatoj respondecaj pri la vivo de la lando.
- IV – La Vorto de la Eklezio al la mondo baziĝas sur ĉio, kion diras la Biblio pri la vivo de homaj komunumoj,

precipe en la dek ordonoj kaj en la biblia instruo pri la Ŝtato, ĝia aŭtoritato kaj ĝiaj limoj. La Eklezio do memorigas al la Ŝtato kaj al la socio la postulojn de vero kaj justeco, kiuj estas tiuj de Dio rilate al ĉiu komunumo (Sen 14:34; 1 Tim 2:1–4; 1 Pet 2:13–14).

La limoj de oboe al la Ŝtato (tezo 5)

V – La Eklezio agnoskas la aŭtoritaton de la Ŝtato, kiun Dio volas por la komuna bono, ŝi instigas siajn membrojn lojale plenumi siajn devojn kiel civitanoj, ŝi memorigas al ili, ke ĉiu kristano ŝuldas obeon al la Ŝtato, komprenante, ke tiu ĉi oboe estas ordonita, kaj submetita al la absoluta oboe pro Dio sola. La vorto de Dio ekzercas ordonon kaj kontrolon super ĉia oboe al homoj (Agoj 4:12; Agoj 5:29; Rom 13:1–4).

Respekto por individuaj liberecoj (tezo 6)

VI – Kvankam agnoskante, ke la postuloj de la komuna bono povas trudi iujn esceptajn rimedojn, la Eklezio memorigas, ke la misio de la Ŝtato estas certigi por ĉiu civitano juran sistemon garantiantan la esencajn liberecojn, ekskludante ĉian maljustan diskriminacion, ĉian sistemon

de denunco, ĉian arbitrecon, precipe rilate al justico kaj polico (2 Kro 19: 6–7; Pre 5:7–8; Amos 5:15, 24; Rom 13:4).

La protesto kontraŭ la statuso de la Judoj (tezo 7)

VII – Surbaze de la Biblio, la Eklezio agnoskas ĉe Izrael la popolon, kiun Dio elektis por doni savanton al la mondo kaj esti, meze de la nacioj, konstanta atestanto de la mistero de sia fideleco. Tial, agnoskante, ke la Ŝtato estas antaŭ problemo, al kiu ĝi devas doni solvon, ŝi levas solenan proteston kontraŭ ajna statuso, kiu forĵetas la Judojn ekster la homaj komunumoj (Rom 11:1–36).

La denunco de totalitarismo kaj kunlaboro (tezo 8)

VIII – Kondamnante ambiguecojn, la Eklezio asertas, ke neevitebla submetiĝo al la venkinto ne povas esti prezentata kiel ago de libera aliĝo. Akceptante la materiajn kondiĉojn de la malvenko, ŝi konsideras reziston al ĉia totalitarisma kaj idolkulta influo kiel spiritan neceson (Jeĥ 28:2–9; Dan 3; Mat 5:37; Heb 12:4).



Subskribintoj:

Laikoj: Suzanne de Dietrich kaj Madeleine Barot (Cimade), René Courtin (profesoro ĉe la jura fakultato de Montpellier)
Pastroj en oficejo: Jean Cadier (profesoro ĉe la Fakultato de Protestanta Teologio de Montpellier), Pierre Courthial (La Voulte), Jacques Deransart (Valdrôme), Pierre Gagnier (Nico), Paul Conord (Albi)
Roland de Pury (Lyon), André de Robert (migranta evangeliisto).

Gvidantoj de junularaj movadoj: Georges Casalis (Ĝenerala Sekretario de la Franca Federacio de Kristanaj Studentaj Asocioj, "Fédé"), Jean Gastambide (Ĝenerala Sekretario de la Franca Federacio de Uniismaj Skoltoj).

Financa raporto de KELI 2021

(ĉiuj sumoj en EUR)

Bilancoj fine de la jaroj 2020 2021

Aktivoj

Stoko de libroj	4.925,03	4.925,03
Stoko de kasedoj, E-Misio	116,00	116,00
<i>Provizo</i>	<u>5.041,03</u>	<u>5.041,03</u>

Kasista kaso	860,00	570,00
Sekretaria kaso	1.611,00	1.379,00
UEA-konto kelk-p	25.047,20	1.726,64
Ĝir-konto, CIC-banko	570,08	3.566,33
Ŝpar-konto, CIC -banko	<u>22.816,96</u>	<u>42.847,33</u>
<i>Monrimedoj</i>	<u>50.905,24</u>	<u>50.089,30</u>

Sumo de aktivoj 55.946,27 55.130,33

Pasivoj

Kapitalo	33.598,47	32.554,12
Rezulto de la jaro	-1.035,35	-1.180,94
<i>Kapitalo entute</i>	<u>32.554,12</u>	<u>31.373,18</u>

Dumvivaj membroj	1.650,50	1.532,50
E-Misio	6.894,51	6.894,51
Helpa kaso	1.020,08	1.020,08
Kongresa rezerva kaso	823,48	823,48
Literatura/Himnara kaso	<u>12.903,58</u>	<u>12.903,58</u>
<i>Fondusoj entute</i>	<u>23.292,15</u>	<u>23.174,15</u>

Kreditoroj	0,00	0,00
Evidente	0,00	573,00
KELI-abonoj de EK	0,00	10,00
Kongresaj kotizoj	<u>100,00</u>	<u>0,00</u>
<i>Transitaĵoj kaj pasivoj</i>	<u>100,00</u>	<u>583,00</u>

Sumo de pasivoj 55.946,27 55.130,33

Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2021.12.31

Aktivoj

Stokoj

En la jaro 2021 ne ŝanĝiĝis la stokoj de libroj aŭ kasedoj.

Monrimedoj

Kasista kaso estas ĉe Ágnes Ráczkevy-Eötvös HU, kutime kun malalta sumo.

Sekretaria kaso estas mono ĉe bankkonto kaj kaso de Ĉeĥa sekcio de KELI, kiujn uzas Pavel Polnický CZ, kiu zorgas pri la presado kaj dissendado de Dia Regno.

KELI havas bankkontojn ĉe UEA (kelk-p) kaj ĉe la franca CIC banko (ĝir- kaj ŝpar-konto).

Pasivoj

Kapitalo

Kapitalo enhavas la sumigitan rezulton de la antaŭaj jaroj.

La rezulto de la jaro 2021 estis bedaŭrinde negativa: - 1.180,94 eŭroj.

Fondusoj

Laŭ la decido de la estraro Dumvivaj membroj, E-Misio, Helpa kaso, Kongresa rezerva kaso kaj Literatura/Himnara kaso estas aparte montritaj.

Transitaĵoj kaj pasivoj

En la jaro 2021 ni povis havi kongreson (en Legnica, Pollando), kaj dum la kongreso ni kolektis monon al la fonduso *Stichting*

Zienderogen (antaŭa Evidente). Ankaŭ sendis tiucele monon al la bankkontoj KELI-anoj. La sumon kiel kutime ni ĝiris al la fonduso helpi la laboron, kiun komencis Jacques Tuinder NL.

Same la abonkotizo de Espero Katolika jam estas ĝirita al IKUE.

Rezulto 2021 kaj buĝetoj 2021, 2022 kaj 2023 (ĉiuj sumoj en EUR)

	Buĝeto 2021	Rezulto 2021	Buĝeto 2022	Buĝeto 2023
Enspezoj				
Kotizoj/Abonoj	2.000	2.311,55	2.000	2.000
Kotiz- kaj kursdiferencoj	0	1,89	0	0
Adopta Kaso	300	80,00	300	300
<i>Kotizoj entute</i>	<u>2.300</u>	<u>2.393,44</u>	<u>2.300</u>	<u>2.300</u>
Librovendado	100		100	100
Rentumoj	25	30,37	25	25
Profito el kongreso	200	0,00	200	200
<i>Aliaj enspezoj</i>	<u>325</u>	<u>30,37</u>	<u>325</u>	<u>325</u>
Enspezoj entute	2.625	2.423,81	2.625	2.625
Elspezoj				
Presisto + sendado de DR	2.600	2.432,00	2.600	2.600
Perantoj	0	0,00	0	0
<i>Revuokostoj</i>	<u>2.600</u>	<u>2.432,00</u>	<u>2.600</u>	<u>2.600</u>
Prezidanto	40	40,00	20	20
Sekretario	140	140,00	70	70
Redaktoro	300	300,00	150	150
Kasisto/Matrikulisto	20	20,00	20	20
<i>Estrarkostoj</i>	<u>520</u>	<u>520,00</u>	<u>260</u>	<u>260</u>
UEA-kotizo	65	44,00	65	65
Bankkostoj	65	66,75	65	65
Merituloj	50	542,00	50	50
UK Lukostoj	50	0,00	50	50
<i>Generalaj kostoj</i>	<u>230</u>	<u>652,75</u>	<u>230</u>	<u>230</u>
Librovendado (kostoj)	10	0,00	10	10
Varbado (Inf./varba kaso)	10	0,00	10	10
Malprofito de la kongreso		0,00		
Rabatoj de perantoj	5	0,00	5	5
<i>Aliaj elspezoj</i>	<u>25</u>	<u>0,00</u>	<u>25</u>	<u>25</u>
Elspezoj entute	3.375	3.604,75	3.115	3.115
Saldoj	-750	-1.180,94	-490	-490

Klarigoj kaj rimarkoj pri la Rezulto 2021 kaj la Buĝetoj 2022/2023

Enspezoj

Kotizoj

Ankaŭ la jaro 2021 pro la kronviroza pandemio estis alia ol ni ĉiuj planis. La Kotizoj en 2021 estis iom pli altaj ol planitaj, ĉar estis membroj, kiuj pagis dujaran kotizon. Bedaŭrinde al la Adopta kaso pli malmultaj mondonacoj alvenis ol ni esperis. La Adopta kaso estas mondonacoj de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Ili estas petataj kontribui “laŭforte”. Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacoj.

Aliaj enspezoj

La rentumoj estis pli altaj, ol ni planis, aliaj enspezoj ne okazis.

Elspezoj

Revuokostoj

La kostoj de Dia Regno enhavas kaj la presadon kaj la dissendadon.

Estrarkostoj

En 2020 ni ne povis persone renkontiĝi, pro tio estraranoj ne povis ricevi la simblan kontribuon por siaj laboroj. Pro tio en la jaro 2021 ni pagis por ambaŭ jaroj, sed ni jam tiel modifis la buĝeton antaŭe.

Ĝeneralaj kostoj

En tiu ĉi kategorio en la jaro 2021 estis la UEA-kotizoj kaj la Bankkostoj. Estraro decidis helpi por aĉeti novan komputilon redakti kaj dissendi IRDE (Internacia Reta Diservo Esperante), pro tio estas la kosto de Merituloj pli alta ol origine estis planita. UK ne okazis ankaŭ en 2021.

Aliaj elspezoj

Aliaj elspezoj ne okazis en 2021.

Saldoj

La saldo de la jaro 2021 estis bedaŭrinde negativa: -1.180,94 eŭroj, sed ni origine kalkulis preskaŭ tiele. Kaj la enspezoj estis iom pli malaltaj, kaj la elspezoj pro la aĉetado de la komputilo estis pli altaj ol ni planis. Espereble baldaŭ finiĝos la monda pandemio, kaj la sekvontaj jaroj estos ekonomie pli bonaj. La financa bazo de KELI daŭre estas sufiĉe kontentiga.

Buĝetoj

La Buĝetoj de la jaroj 2022 kaj 2023 tamen enhavas negativan rezulton. Ni daŭre estas optimismaj, kaj ni kredas ke la membraro de KELI daŭre subtenos nian ligon. Ni daŭre estas optimismaj, kaj ni kredas ke la membraro de KELI daŭre subtenos nian ligon.

Tagordo por la jarkunveno de KELI 2022

- 1 Malfermo
- 2 Elekto de kunprotokolantoj
- 3 Akcepto de la tagordo
- 4 Komunikoj
- 5 Funebra memorigo
- 6 Sekretaria jarraporto
- 7 Kasista jarraporto
- 8 Raporto de la kaskontrolantoj
- 9 Diskuto kaj akcepto de la raporto
- 10 Buĝetoj
- 11 Raporto de la redaktoro
- 12 Estrarelekto
- 13 Kongresplanoj – 2023
- 14 Proponoj kaj sugestoj de la membroj
- 15 Fermo

Klarigoj:

(12) Ĉi-jare finiĝas la deĵor-periodoj de ĉiuj estraranoj. Ĉiuj estas reelekteblaj.

(13) Propono pri la KELI-kongreso 2023: Bjalistoko en Pollando.

Tial demokratio

Intervjuo kun Åsa Wikforss, filozofo

Tradukis kaj adaptis el gazeta intervjuo Bengt Olof ÅRADSSON, SE

La kuratako de la Kapitolo la 6an de januaro 2021 montras kiel zorge planita kaj disvastigita mensogo pri ŝtelita elekto povas fundamente skui okcidentan demokration. Åsa Wikforss opinias, ke la minaco, kiun ĉi tiu “postvera tempo” prezentas al la demokratia registaro, ankaŭ ne povas esti trotaksata.

Ŝi celas la minacon, ke demokratio iom post iom fariĝos tiel malfunkcia, ke

ĝi donas eblecon al aŭtoritataj gvidantoj, kiel Trump, esti elektitaj kaj poste paŝo post paŝo malmunti demokration.

La sanstato de la okcidenta demokratio nuntempe estas sur balancilo. Kiu flanko plej pezas? La popolismo, misinformado kaj neado de faktoj minacas demokration. Troviĝas vivminacan sorĉadon, kiu kreas “emocian polusiĝon” en la socioj. Faktoj, vero kaj scio fariĝas

sensignifaj, kiam grupoj tute perdis konfidon unu al la alia.

Ke oni manipulas homojn por voĉdoni en certa maniero, ke homoj koleriĝas unu kontraŭ la alia, ke ili ne volas plu kompromisi, ke ili perdas konfidon al la institucioj ktp. Kaj ĝi preparas por laŭgrada malmuntado de demokratio, kiun ni vidis en kelkaj landoj en Eŭropo.

En nur tri generacioj ni sukcesis forgesi kial demokratio estas bona!

Unue, la eterna paca argumento: demokratioj ne batalas unu la alian, tio estas forta empiria fakto. Demokratioj ankaŭ ne rezultigas al genocido; publika sano estas pli alta; infana morteco estas pli malalta, ktp.

Kaj do, kompreneble, temas pri la enkonstruita pluralismo. Ke homoj havas la rajton elekti kiel ili volas vivi sian vivon, kiun ili volas ami, kian kulturon ili aprezas.

Ĉar ne sufiĉas nur diri, ke ĉiuj volas demokration. Ĝi estas nur bela, sensignifa vorto. Kaj tio estas rekte danĝera.

Kiam libereco de esprimo, sendependa gazetaro, sendependaj tribunaloj kaj sendependa esploro malaperas, tiam malaperas ankaŭ la kadro, kiu faras demokration pli bona ol aliaj ŝtatoj. Se vi forigas tion, restas al vi nur la vorto.

La limigita esprimlibereco tiel malfaciligas la traktadon de la publika opinio por la demokratio.

Dum la lastaj dek jaroj la tiel nomata aŭtokratiga procezo rapide iris, ĉar la sociaj retoj transprenis la publikan paroladon kaj la popolistoj ekspluatis ĝin.

La efiko de sociaj amaskomunikiloj sur misinformado estas konata, kaj novaj

esprimformoj kaj amaskomunikiloj ĉiam skuis niajn sociojn: de la skriba lingvo, kiu estis konsiderata ke ĝi faciligis mensogon, kiam oni ne devis persone alfronti vian publikon, tra gazetoj kiuj intence disvastigis falsajn rakontojn dum jardekoj antaŭ la fako profesiigis, propagando per radio kaj televido kaj do nun misinformado kaj malamo en Fejsbuko kaj Tvitero.

Kio do estas la kuracilo kontraŭ la falo de demokratio? Unu parto estas la rolo de la teknologiaj gigantoj — kiel povas sociaj amaskomunikiloj, kiuj principe akiris monopolon pri publika spaco, preni respondecon kaj esti reguligitaj.

Alia parto estas, ke la tradiciaj amaskomunikiloj ne disvastigu ideojn pri konspiraj teorioj. Evidenta kuracilo estas scio: publika edukado kaj la grava laboro de lernejoj.

Aliaj konsiloj kaj avertoj direktas sin al ĉefaj politikistoj ĉie, ĉar la popolistoj ne povas saboti demokration per si mem. Maksimume ili ricevas subtenon de 20–25 procentoj de balotantoj, laŭ politikaj sciencistoj. Ili do devas havi la subtenon de aliaj politikaj fortoj — kiel ekzemple kiam gvidaj respublikanoj en Usono karesis Trump kaj liajn balotantojn.

Nur tiam la popolistoj povas kapti la povon, akiri koncedojn de aliaj partioj kaj komenci la malmuntadon de la institucioj de demokratio. La maltrankviliga afero nun estas, ke establitaj partioj en Eŭropo, ankaŭ en Svedio, pretas alianciĝi kun la popolismaj partioj. Kiom malproksimen ili tiam pretas iri por renkonti ilin, restas demando.



Tradukis Bengt Olof ÅRADSSON, SE

La hugenota kruco estas kristana religia simbolo originanta de Francio kaj estas unu el la pli rekoneblaj kaj popularaj simboloj de la franca evangelia reformita kredo.

Ĝi estas ofte trovita hodiaŭ kiel juvelaĵo (en oro aŭ arĝento) aŭ gravurita sur konstruaĵoj ligitaj kun la Reformita Eklezio en Francio, de kiu ĝi reprezentas la oficialan emblemon.

Oni foje asertas, ke la kruco aperis unuafoje dum la hugenotaj militoj (1562–1598) en suda Francio.

Alia aserto estas ke anstataŭe la hugenota kruco elstaras kiel “la plej malkaŝa” el simbolaj signoj de hugenota solidareco: “Kvankam hugenota kruco estis efektive dezajnita en Nîmes en la 1680aj jaroj, ĝi neniam estis la simbolo de rekono en Francio, kio ĝi poste iĝis en la lasta triono de la dekaŭa jarcento”.

Longe post la revoko (1685) de la Nanto-Edikto (1598), la hugenota kruco venis en ĝeneralan uzon inter 19-jarcentaj hugenotaj posteuloj en landoj, kie hugenotaj rifuĝintoj ekloĝis, kiel signo de kaj identigo kun franca hugenota deveno kaj konfirmo de la kredo de la portanto.


En 1942, la liberfrancaj protestantoj en Britio emisiis insignon, kiu parigis la hugenotan krucon kun la Kruco de Loreno, kiu estis ekuzita de la Liberaj Francaj Trupoj.

Simboleco

La simboleco de la hugenota kruco estas tre riĉa.

- La kruco kiel eminenta simbolo de la kristana kredo, reprezentas ne nur la morton de Kristo sed ankaŭ venkon super morto kaj malpieco. Tio estas reprezentita ankaŭ en la malta kruco.
- La *boutonné*, la ok butonoj simbolante la ok beatecojn (Mateo 5:3–12)
- Inter la brakoj de la kruco estas la stiligita *fleur-de-lis* [lilifloro], ĉiu havante 3 petalojn; la totalo de dek du petaloj de la lilifloro signifas la dek du apostolojn. Inter ĉiu lilifloro kaj la brakoj de la malta kruco, kun kiu ĝi estas kunligita, troviĝas malferma spaco en formo de koro, la simbolo de lojaleco, kaj sugestas la sigelon de la franca reformanto, Johano Calvin.
- La pendanta kolombo simbolas la Sanktan Spiriton (Rom 8:16). En tempoj de persekuto, perlo, simbolanta larmoguton, anstataŭigis la kolombon.

☪



La hugenota kruco apud la insigno de K.E.L.I.

Informetoj

Korespondeto

Saluton Kara, mi nomiĝas Augustin Kakozwa, kongano de la Respubliko Demokratia Kongo, loĝanto en la urbo Goma, kie mi instruas Esperanton al la infanaj georfoj, kiujn nia Asocio Nova Familio prizorgas.

Hazarde mi trovis vian retadreson, tial mi profitas per ĝi retmesaĝi, petante ekkorespondi kun vi, laŭ via deziro.

Mi al kroĉas foton pri la infanoj kiujn mi instruas kaj ankaŭ la logon de nia asocio.

Mi ĝojos legi vian respondon.²

Amike
Augustin

Augustin KAKOZWA
augukako@gmail.com



Venu, Spirito, venu al ni

(originale verkita en Esperanto)



Ve-nu, Spi - ri - to, ve-nu al ni,
ve - nu, ho Di - a tre - zo - ro.
Ve - nu, Spi - ri - to, res - tu en ni,
pro - fun - da in - ti - mo de l' ko - ro.
1. Vent', ŝtorm', ze - fi - ro kaj blouv!
2. Brul', var - mo, faj - ro kaj flam!
3. Kon', saĝ' kaj for - to de l' vol!
Pel', spron', in - sti - go kaj pov!
Fer - vo - ra ar - do de l 'am!
Sci', ver', kon - sil' kaj kon - sol!
For - te nin mo - vu, Di - a Spi - rit',
al a - go, al am', al a - do - ro.

VENU, SPIRITO, VENU AL NI • M kaj E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2022-02-23